

Informilo de Septembro, 2017

Numero 30, septembro 2017

Unesko-Kuriero nun ankaŭ en Esperanto

19 julio 2017. La nove relanĉita revuo de UNESKO, Unesko-Kuriero, nun aperas ne nur en la ses oficialaj lingvoj de UNESKO sed ankaŭ en la internacia lingvo Esperanto – dank' al ĉina iniciato kaj la helpo de esperantistoj tra la mondo.

Unesko-Kuriero estas la oficiala revuo de UNESKO (Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo). Ĝi ekaperis en 1946. Kiel grava komunikilo por disvastigi la ideojn de Unesko kaj antaŭenigi la interkulturajn dialogojn, la revuo iam ludis gvidan rolon por disvolvi la celojn de Unesko en la kampoj pri kiuj ĝi respondecas. Bedaŭrinde la revuo devige ĉesis ekde 2012 pro manko de financaj rimedoj.

En majo 2017, post reapero de la 76-paĝa plenkolora Unesko-Kuriero en formato A4, UEA tuj lanĉis projekton pri eksperimenta eldono de Unesko-Kuriero en Esperanto, laŭ iniciato de la UEA-komitato Trezoro Huang Yinbao, direktoro de Esperanto-Centro Ora Ponto Ĉinio. Dank' al kunlaboro de 36 tradukintoj kaj provlegintoj en 23 landoj, kaj financa subvencio de Esperanto-Centro Ora Ponto Ĉinio, la unua numero de Unesko-Kuriero en Esperanto povis aperi.

Antaŭ jaroj, multaj esperantistoj alvokis ke Unesko eldonu sian Kurieron ankaŭ en Esperanto. Amaso da retaj mesaĝoj bombe ĝenis la funkciulojn de Unesko, kiuj kelkfoje respondis: “se UEA aŭ iu alia pretas financi ĉion, Unesko pretas doni permeson al Esperanta eldono de Unesko-Kuriero.” (Eventoj 182/2000).

La papera eldono (ISSN 2521-7356) estas aĉetebla ĉe Universala Esperanto-Asocio. La reta versio (ISSN 2521-7364) estas senpage elŝutebla ĉe UEA-retejo: http://uea.org/pdf/Unesko-Kuriero_1-2017.pdf

UEA nomis du novajn membrojn al sia Honora Patrona Komitato

30 julio 2017. La Honora Patrona Komitato de UEA ekhavis du novajn membrojn: Harald Helfgott kaj Giorgio Novello. La honora organo konsistas el lingvistoj, sciencistoj kaj aliaj eminentuloj, kiuj faris gravajn servojn al la Esperanto-Movado kaj mem parolas kaj verkis en la Internacia Lingvo.

Harald Helfgott (n. 1977.11.25, Limo, Peruo), monde konata matematikisto, estas Humboldt-profesoro ĉe la Universitato de Göttingen, Germanio. Post studado en la usonaj universitatoj Brandeis kaj Princeton, kie li doktoriĝis en 2003, liaj originalaj esploroj kondukis lin tra la universitatoj Yale (Usono), Montréal (Kanado) kaj Bristol (Britio), ĝis konstanta posteno kiel supera esploristo en la Nacia Centro de Sciencaj Esploroj (CNRS, Francio). D-ro Helfgott estas specialisto pri la teorio de nombroj, sed liaj esploroj ampleksas plurajn aliajn branĉojn de pura matematiko, inkluzive de grupteorio kaj kombinatoriko. Jam frue en sia kariero li atingis vastan rekonon en sia fako, i.a. per la Premioj Leverhulme (2008) kaj Whitehead (2010), aljuĝitaj al speciale promesplenaj junaj esploristoj, kaj la prestiĝa Premio Adams (2011) de la Universitato de Kembriĝo. Mondan renomon li akiris en 2013 per sia pruvo de la malforta (aŭ triterma) konjekto de Goldbach, kiu dum pli ol 250 jaroj rezistis solvon. Tiu atingo helpis gajni por li la Humboldt-profesorecon, unu el kelkaj postenoj en Germanio rezervitaj al pintaj fakuloj sur diversaj sciencaj kampoj, kun granda esplorbuĝeto.

Giorgio Novello estas ambasadoro de Italio ĉe la registaroj de Norvegio kaj Islando. Post studado pri juro en la Universitato de Padovo, li eklaboris en la itala diplomacia servo en 1986, dum 15 jaroj deĵorante en Romo, Niĝerio, Britio kaj Germanio. Dum tiu tempo li krome studis en Parizo kaj Londono, kaj ricevis diplomon pri ekonomiko ĉe la Universitato de Londono en 1994. De 2002 ĝis 2006 li laboris kiel Unua Konsilisto de la Konstanta Misio de Italio ĉe la Organizo por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, en Vieno. En 2004 li ricevis la titolon de Oficisto de la Ordeno pro Merito de la Itala Respubliko, kaj samjare magistriĝis pri ekonomia historio ĉe la Londona Altlernejo pri Ekonomiko.

Ekde 2006, Novello deĵoris ĉe la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj en Romo, kiel fakestro pri Internaciaj Financaj Institucioj, kaj ekde 2008 kiel konsilisto al la Ministro pri Ekonomia Disvolviĝo. Dum tiu periodo li ankaŭ gvidis kursojn pri internaciaj rilatoj ĉe la Universitato de Triesto, en kiuj estis i.a. Esperanto. Li ricevis la postenon de ambasadoro en 2013. Liaj diplomaciaj talentoj, apogitaj de vasta klerigo pri juro, literaturo, ekonomio kaj historio, estis agnoskitaj de la franca registaro per la titolo Kavaliro de la Nacia Ordeno pro Merito (2013), kaj de la norvega registaro per la Granda Kruco de la Reĝa Norvega Ordeno pro Merito (2016).

Aliaj membroj de la Honora Patrona Komitato estas Ulrich Brandenburg, iama germana ambasadoro en Moskvo kaj Lisbono, Chang Choon-sik, eksa prezidanto de Universitato Dankook (Korea Respubliko), Humphrey Tonkin, emerita prezidanto de la Universitato de Hartford (Usono), Giuliano Turone iama juĝisto de la Supera Apelacia Tribunalo de Italio, kaj John C. Wells, emerita profesoro pri fonetiko en la Universitato de Londono.

UEA gratulis al UN pro enkonduko de gestolingva interpretado

14 julio 2017. Cesco Reale kaj Stefano Keller, UEA-reprezentantoj ĉe UN en Ĝenevo, partoprenis kunsidojn de la 10a sesio de Ekspertaj Mekanismoj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (EMRIP), okazinta en la Palaco de Nacioj inter la 10a kaj 14a de julio 2017.

La temoj de la evento, kies sesiojn UEA-teamanoj kutime ĉeestas, ĉi-jare inkluzivis: analizon de la situacio pri la partopreno de indiĝenoj en la UN-sistemo, kaj prezentadon de bonaj praktikaj ekzemploj celantaj la realigon de la 10-jariĝinta Deklaracio de UN pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj. La 8a tagorda punkto temis interalie pri la rajto de indiĝenaj popoloj je kultura heredaĵo, inkluzivanta la gepatran lingvon. Signifa novaĵo en la aranĝo estis la interpretado por surduloj. Fine de la aranĝo Keller interparolis kun la triopa gestolingva laboroteamo kaj kun la respondeculo de la Palaco de Nacioj pri konferencaj servoj, S-ro H. P. Colas, dankante kaj gratulante ilin pro tiu nova servo de UN, kiu subtenas la lingvajn rajtojn de surduloj, ebligante ties partoprenon en la diskuto.

Reale kaj Keller ekspoziciis en la kunveno informilojn pri Esperanto, UEA, la Zamenhof-jaro, kaj interparolis kun indiĝenoj kaj NRO-reprezentantoj. Krome, ili esploris pri ebloj organizi paralelan eventon ĉe UN, okaze de iu simila venonta kunsido. <http://www.linguistic-rights.org/eventoj>

Daŭripova turismo estis la temo de la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto

30 julio 2017. Observe al la Internacia Jaro de Daŭripova Turismo por Evoluigo, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj (UN) por 2017, la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto, en Seulo, Korea Respubliko, pritraktis la temon "Turismo kaj evoluo: Vojo al daŭripovo." En kvin sesioj sub gvido de Stephanie Cabovianco (Argentino), la kongreso notis "la urĝecon redukti la ekologiajn kaj sociajn damaĝojn, kiujn kaŭzas multaj formoj de turismo, kaj disvolvi novajn kaj pli daŭripovajn formojn." La temo aparte gravas al parolantoj de Esperanto ĉar "ties anoj ofte vojaĝas por renkonti unu la alian kaj por ekkoni la riĉecon de aliaj kulturoj." La kongreso emfazis "la esencan rolon kiun ludas komuna lingvokono en la perado de reciprokaj kontaktoj inter homoj de malsamaj kulturoj, kaj la unikajn kontribuojn de Esperanto sur tiu kampo" kaj konfirmis "la volon de nia movado daŭre labori por aktive engaĝi, eduki kaj inspiri homojn en ĉiuj landoj al pli inkluziva kaj konscia turisma kulturo."

Farante tion, ĝi eĥis multajn aliajn deklarojn pri la ligo inter turismo kaj lingvoj, faritajn tra la jaroj, inkluzive de la Manila Deklaracio de la Monda Turisma Organizaĵo de UN (1985), kiu substrekis "la gravecon de scio de lingvoj, precipe tiuj kun universala celo, kiel Esperanto."

Ĉeestis la kongreson 1174 parolantoj de Esperanto el 61 landoj.

Sekvas la plena kongresa rezolucio:

*Ni, 1174 partoprenantoj en la 102-a Universala Kongreso de Esperanto, venintaj el 61 landoj de ĉiuj mondopartoj al Seulo, Koreio, **Volante kontribui** al la laboroj por la Internacia Jaro de Daŭripova Turismo por Evoluigo, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj (UN) por 2017, **Diskutinte** la temon "Turismo kaj evoluo: Vojoj al daŭripovo" en pluraj sesioj kaj el multaj vidpunktoj tra la kongresa semajno, **Konstatante** la gravecon de daŭripova turismo por la tutmonda Esperanto-lingvokomunumo, kies anoj ofte vojaĝas por renkonti unu la alian kaj por ekkoni la riĉecon de aliaj kulturoj, **Emfazante** la esencan rolon kiun ludas komuna lingvokono en la perado de reciprokaj kontaktoj inter homoj de malsamaj kulturoj, kaj la unikajn kontribuojn de Esperanto sur tiu kampo; **Asertas** la urĝecon redukti la ekologiajn kaj sociajn damaĝojn, kiujn kaŭzas multaj formoj de turismo, kaj disvolvi novajn kaj pli daŭripovajn formojn; **Invitas** aktivulojn pri daŭripova turismo konsciiĝi pri la grandaj avantaĝoj de komuna neŭtrala lingvo por la kultivado de respondecaj kaj reciprokaj rilatoj inter turistoj kaj gastigantoj; **kaj** **Konfirmas** la volon de nia movado daŭre labori por aktive engaĝi, eduki kaj inspiri homojn en ĉiuj landoj al pli inkluziva kaj konscia turisma kulturo.*

Portugaliao, Finnlando kaj Kanado: Celoj de la tri venontaj Universalaj Kongresoj de Esperanto

30 julio 2017. Kiel jam sciante, la venontjara Universala Kongreso de Esperanto okazos en Lisbono de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2018. Oni antaŭvidas apartan atenton al la artaj aspektoj de Esperanto, precipe rilate literaturon, teatron kaj muzikon. La kongreson plej verŝajne ĉeestos dumilo da parolantoj de Esperanto el ĉiuj partoj de la mondo. En la nunjara kongreso en Seulo, oni anoncis la urbojn de la kongresoj de 2019 kaj 2020, nome Lahti, Finnlando, kaj Montréal, Kanado, respektive.

Kongresanoj diskutis korean reunuiĝon kun sudkoreaj parlamentanoj – en Esperanto kaj korea

29 julio 2017. Internacia kunveno pri la reunuiĝo de la du Koreioj, kiun partoprenis la parlamenta vicprezidanto, la estroj de du koreaj politikaj partioj kaj multaj parlamentanoj okazis hodiaŭ en la sidejo de la Sudkorea Parlamento. Multaj deputitoj kaj 130 interesatoj el 21 landoj ĉeestis, inkluzive de diplomatoj kaj politikistoj kiuj samtempe partoprenis la Universalan Esperanto-Kongreson okazantan ĉi-semajne en Seulo. Vivoplena debato okazis inter la prezidanto de la kunveno, korea profesoro So Gilsu kaj 14 anoj de la ronda tablo. La ĉeestantoj klare rimarkis, ke la internaciaj partoprenantoj estis influataj de la amasmedioj de siaj respektivaj landoj, siaj libroj pri historio, siaj vojaĝoj kaj siaj spertoj rilate la nordkorean situacion, sed evidente la internacia debato multon klarigis.

Kiel klarigis la vica kunvenestro de la parlamento, Park Joo, "Post la jaro 2000, Sudo kaj Nordo fine komencis okazigi pintkunvenojn kiuj produktis etoson de paca kunlaboro rilate reunuiĝon de dividitaj familoj, ekonomian kunlaboron kaj diversajn kulturajn interŝanĝojn. Sed tra la pasintaj dek jaroj, la rilato inter Sudo kaj Nordo interrompiĝis ... pro diversaj militaj provokoj. Krome, iuj potencoj luktas por hegemonio en la Korea Duoninsulo kaj sekve nia lando troviĝas en stato de politika kaj ekonomia konfuzo kaj agiteco. Cele al paco kaj trankvilo en Nordorienta Azio, ni devas kiel eble plej baldaŭ rediskuti la reunuiĝon de Koreio."

La konferenco, kies celo estis konsciiĝi pri la bezono de reunuiĝo, okazis sub la patroneco de la metropola urbo Seulo kaj estis organizita de Korea Esperanto-Asocio kun subteno de la Korea Parlamento. La debato okazis en du lingvoj: Esperanto kaj la korea, kun simultana interpretado.

Prelegoj Soros, 13 oktobro, 10 novembro, pritraktos Esperanton

10 aŭgusto 2017. La finaj du prelegoj en la prelegserio Tivadar Soros prezentos profesoron Nico Israel (13 oktobro) kaj eldoniston Ulrich Becker (10 novembro). Ambaŭ prelegoj okazos ĉe City University of New York Graduate Center, 34-a strato kaj Kvina Avenuo, en la urbo New York.

"Militopucos: James Joyce and Universal Language" estos la temo de la prelego de prof. Israel. Li priskribas la prelegon kiel "diskuton de ĉerpaĵoj Esperanto-rilataj en la romanoj de James Joyce Ulysses kaj Finnegans Wake, ĉi tie traktataj de neesperantista literatura esploristo. Laŭtemaj estas la pozicioj de Joyce rilate arton, lingvon kaj geston dum milita epoko." Nico Israel estas profesoro de angla literaturo ĉe CUNY Graduate Center kaj Hunter College.

La temo de la prelego de Ulrich Becker estos "Esperanto estas (ne) morta: Pri la daŭra fendo inter la percepto de Esperanto kiel lingvo sen kulturo kaj ĝiaj eksterordinaraj kulturaj atingoj." Li aldonas: "Tra la historio de Esperanto, ĝiaj adeptoj devis fronti kritikon, ke ili disvastigas

lingvon kiu ne kapablas evoluigi daŭripovan kulturon ĉar ĝiaj parolantoj ne estas etne aŭ kulture difinebla grupo, nek bazita en geografie unueca areo. La efektivaj kulturaj atingoj de Esperanto parolas tute alimaniere – rilate la grandan kulturen produktadon ene de la Esperanto-movado kaj la signifan kulturen efikon kiun Esperanto havas en la vasta mondo. La prelego donos atenton, interalie, al la kampo de eldonado en Esperanto.”

Ulrich Becker estas estro de la eldonejo Mondial, kiu specialistas pri libroj en kaj pri Esperanto kaj aperigas unu el la ĉefaj literaturaj revuoj de la movado. Li estas aŭtoro de prozo kaj poezio en Esperanto kaj la germana, estis kunfondinto de la Germana Societo pri Interlingvistiko kaj laboris kiel administranto, organizanto kaj redaktoro en naciaj Esperanto-organizaĵoj.

La prelegserio honoras la memoron de Tivadar Soros, kies du verkoj en Esperanto, Modernaj Robinzonoj kaj Maskerado ĉirkaŭ la morto, priskribas liajn spertojn en respektive la Unua kaj Dua Mondmilitoj. La prelegoj, prezentitaj en la angla, prezentas la laboron de pluraj fakuloj el la regiono de Novjorko kiuj aktuale esploras pri Esperanto kaj planlingvoj.

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041

www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041